# TEJO-aktuale: numero 204, 2008-10

TEJO - Aktuale, n-ro 204
------------------------

1. - 29-a Malferma Tago en la CO de UEA, 29-an de novembro, Roterdamo

Andy Künzli el Svislando kaj Alejandro Cossavella el Argentino estos
la cxefaj gastoj en la 29-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA,
kiu okazos sabaton, la 29-an de novembro. Tiu cxi Malferma Tago estos
la unua post la fino de la renovigo de la UEA-domo, kie nun okazas la
lasta fazo de tiu plurjara projekto.
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/795

-----------------------------------------------------------------------

2. Mangxi, trinki kaj membri en TEJO

Tri bazaj neprajxoj por povi gxui la vivon. Ni provu mencii kelkajn
kialojn, kial bonas esti individua membro en TEJO, kvankam ili
multegas: vi estas en kontakto kun tutmonda juna E-komunumo pere de
la revuo Kontakto, kiun cxiu membro ricevadas; same ankaux pri TEJO
Tutmonde. Vi ankaux povas pli favorpreze aligxi al IJK, la plej
granda renkontigxo de junaj esperantistoj el la tuta mondo. Cxion pri
aligxo al TEJO vi trovas cxe http://www.tejo.org/eo/membrigho.

-----------------------------------------------------------------------

3. 7a Novjara Renkontigxo cxi-jarfine en Frankfurto/Majno, 27.12 - 03.01.

La informoj kaj la aligxilo de la cxi-jarfina 7a Novjara Renkontigxo
(NR) 27a de dec. 2008 gxis 3a de jan. 2009 (sabato gxis sabato)
trovigxas en la reto. (Ankoraux ne pretas la germana versio kaj la
pdf-datumaro.)
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/793

-----------------------------------------------------------------------

4. Renkontigxo de CxEJ en Liberec, 25a gxis 27a de oktobro 2008, Cxehxio

Saluton!

Vi deziris pliaj informoj pri auxtuna CxEJ renkontigxo. Gxi okazigxos
en Liberec ekde 25-a gxis la 27-a de oktobro. Ni logxos en iu lernejo
(ni dormos surplanke en dormosakoj), dumtage ni promenos, dumvespere
kaj dumnokte amuzigxos kaj dimancxe posttagmeze kunsidos cxe la
gxenerala asembleo. La kotizo estos cx. 300 kronoj (por kovri
lukoston). Se vi volos veni, mi tre gxojos. Memkompreneble mi gxojos,
se vi disvastigu tiun cxi informon. Des pli da homoj, ju pli da amuzo!
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/797

Venu liberecumi;-)

Amike, Dan (dan.mrazek cxe gmail.com)

-----------------------------------------------------------------------

5. EEU-Kongreso kaj Germana Esperanto Kongreso (GEK), 28a de majo gxis
3a de junio 2009 en Herzberg, Germanio

E-EU-Kongreso kaj GEK 2009 en Herzberg (nova hejmpagxo por Esperanto-
urbo kaj komunaj kongresoj. Ekde la unua de oktobro vi trovos la
unuajn informojn sur propra hejmpagxo.
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/798

----------------------------------------------------------------------

6. Vintra Folklora Festivalo (Malanka) Karpata regiono

14 januaro an Karpata regiono al Ukrainio urbo Chernivtsy egzistas
tradicia Wintra Folklora Festivalo (Malanka). Ni invitas partopreni
la festo.
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/799

----------------------------------------------------------------------

7. TEJO invitas programistojn al konkurso programi Pasporta Servo 2.0
(limdato 26a de oktobro)

Cxu vi estas programisto kaj jam miris kial la Pasporta Servo de TEJO
ne havas simile modernan retejon kiel "Hospitality Club" aux "Couch
Surfing"? Jen via sxanco por tion sxangxi:
TEJO invitas programistoj partopreni en la konkurso programi novan
Pasportan Servon 2.0 gxis la 26an de oktobro.
Pliaj informoj kaj kriterioj: http://www.tejo.org/eo/node/800

----------------------------------------------------------------------

8. Cxu vi faras Esperantan muzikon? Cxu vi volas publikigi vian muzikon?

Cxu vi volas ke cxiuj povu gxui gxin? Cxu vi volas ke via muziko povas
kontribui al la fina venko? Jen afisxo kiu informas vin mallonge pri
kiel fari vian muzikon pli uzebla por cxiuj, kaj se vi bone faras ecx
gajni pli da mono per gxi...
Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/802

----------------------------------------------------------------------

9. Malnovaj IJK-kongreslibroj sercxata por Biblioteko Hodler

Karaj,

cxu vi estis organizanto aux partoprenanto de iu IJK en la pasinteco?
La arkivo de la IJK-kongreslibroj en Biblioteko Hodler estas
malkompleta kaj petas helpon por kompletigi gxin. Nuntempe mankas la
IJK-kongreslibroj el la jaroj 1966, 1967, 1968, 1976, 1978, 1981,
1985, 1987, 1988, 1994, 1995, 1999, 2000, 2002, 2003, 2004, 2005,
2006, 2007. Do se vi volas helpi kompletigi gxin aux havas iu ajn
informojn, bonvolu kontakti la TEJO-oficejon per
http://www.tejo.org/eo/kontaktu

Dankon por via helpo,
Julia, TEJO-volontulino

-----------------------------------------------------------------------

10. Venontaj renkontigxoj

Auxtuna renkontigxo de Esperanto - 11a gxis 13a de oktobro, Silver Bay,
NY, Usono
http://www.tejo.org/eo/node/794

5-a Rata Rendevuo okazos je la 19-a de oktobro en Emmerthal, Germanio
http://www.tejo.org/eo/node/791

PostSomera KlacxKunveno (PSKK 2008), 31/10 gxis 02/11/2008, Zutendaal, Belgio
http://www.tejo.org/eo/node/790

==================================================================

Ndlr-LS:

- Internacia Kalendaro de cxiuj Esperanto-Arangxoj:
  http://www.eventoj.hu